GISTO, MAR, 2009.
Str. Esperanto,880
Redaktas: ottovaske@ibest.com.br
Bulteno donaca por VK-ĉeestantoj.
Pro sia ĉarmoavaro (forresto)oni ŝuldas R$1,00
Fore loĝantaj samideanoj rajtas ricevi rabaton.

.....

RADIO

Dum la kuranta monato ĉina Radio Internacia plezurigis siajn sudamerikajn aŭskultantojn per tre komforte aŭdebla signalo = S9 kelkfoje S-9+ laŭ 9860 Khc; laŭ 7320 Khc ĝi neniun tagon superis la signalon S9. Mi elstarigas ke mi NE apartenas al la masklisma teamo tial riskas primeki la prononcon de la ĉarmaj fraŭlinoj kiuj aŭdigas siajn voĉojn antaŭ la ĈRI-mikrofono. Rimarkeblas ke al ili malfacilas prononci kelkajn vortojn kiuj enhavas la literon L, ofte iom neglekte prononcas la literojn D kaj T tamen ne grave. Aliflanke la viroj ekzemplodone prezentas tekstojn kun elokventa emfazo al elstaraj faktoj/okazintaĵoj. Kelkaj el ili scias interpreti ĝuste tion kio rimarkindas, laŭ la punktuacio aldonita de la respektiva verkinto...vera plezuro aŭskulti ilin, kun la signalo S-9++. Plaĉus ekscii kiel fartas la veterana parolistino Roza, delonge ŝi ne plu aŭdigas sin?

LARĜBENDO

Finfine mi kuraĝis enŝoviĝi en la elitan klubon Larĝbenda Internet. Nun mi tre esperas helpon el ĉiuj flankoj por konkeri lerton laŭ la sistemo Skajpo, se eble kun kamerao, por fariĝi spektanto de varmaj diskutoj pri la rimedo atingi la finan venkon de nia kara Esperantujo. Domaĝe kiuj lertas, tiuj krom pokaj, tro avaras pri sia scio!.

ENKETO

Kun bedaŭro mi konstatas ke ĝis hodiaŭ (25/03) neniu reagis al mia peto en Gisto-0209, t.e., indiki labortagon de la venonta dua plena semajno de majo, por kuna nekrokodilema tagmanĝo, en la centro de POA. Optimismo pensigas ke ĉiuj ĝisto-leganto estas diligentaj, laboremaj kaj tial forgesis pri mia mencio aŭ preferas respondi dum la okazanta kunsido. Pesimismo pensigas ke ĉiuj nur supraĵe trarigardas la tekstojn kaj, helpe de la rubujo, liberigas sin de la paperaĉo.

KONTENTIGA INICIATO

Ofte oni legas pri maturaj homoj kiuj plendas pro soleco, sen scii kion fari por pasigi valoran tempon. Por aliaj, diligentaj, la tago devus havi tridek horojn aŭ pli. Por agrabla tempopasiga hobio mi sugestas, por neniofarantoj: planti. Sed, vi diros, kiu loĝas en vivimaŝino, apartamento se vi komprenis mian deprecan esprimon, ne havas teron por tia entrepreno. Ja, vere sed por ujo en kiu eblas kreskigi verdaĵon certe troveblas spaco. Ekzemple provi kreskigi sporogonion (burĝonon) deprenitan el kapsika trunketo vekas interesiĝon. Meti ĝin en ujon plenan de humida tero kaj ĉiutage malsekigu ĝin kaj observu ties evoluon, aperon de la unua folieto.Tio estigas entuziasmon kaj vivoĝojon. Preferinde tamen estas lerni/perfektigi sin pri Esperanto aŭ, parkerigu poezion.

MALGRASIGA RIMEDO

Ĉiuj niaj VK-rondanoj daŭre tenas sin sbeltaj kaj certe ne priatentas la

anoncojn pri rimedo kontraŭ grasiĝo, aŭdebla en la R-stacio Gvaiba-FM, 101,3 Mhc. Ĝi ofertas produkton elpensitan de Ceara'-fakultato nomata Kitosana. (laŭ onidiroj, el krustula ŝelo) Laŭ la anonco ĝi absorbas okoble tiom da graso ol ĝi pezas. Tio min pensigis: ĝi estas rafinita recepto por riĉigi la fabrikantojn. Certe ĝi estas ne ĉipa. Ni kalkulu: homo kiu devas perdi ok kilogramojn devas gluti unu kilogramon da piloloj. Bildigu al vi la kvanton glutendan se ulo volas maldikiĝi 20 aŭ 30 Kg! Eble tial ĝi akireblas nur pere de telefona mendo.

MALAVARULO

Manke de Internet, mi devis perpoŝte ekspedi la bultenon Gisto-0209. Nia diligenta samº.Ennio, Torres-RS, krom perletera reago sendis al mi amason da PMj. Kvankam tio, por diligentaj homoj, estas nebezone, mi dankas al vi, karulo!

DEFICITO de GRIZULOJ

Sanaj geedzoj grizharaj, komencas senti seksrilatajn ŝanĝojn. Pro ĉiutagaĵoj kaj kompromisoj, la apetito reduktiĝas. Tio ja estas antaŭsciata. Fakto pli malkonvena tamen prezentiĝas. Olduloj ne tre ofte kutimas revivi siajn ĝuoplenajn tagojn de kiam ili estis 20...30 aŭ 40jaraĝaj. Malofte tio okas tamen io, pri kio ne ĉiuj kalkulis kaj kion kuracistoj ne scias rebonigi, ĝenas. Ne mankas apetito. Erekto okazas tamen la paro diligente navigas sed ne sukcesas "atingi la celon en gloro". Tiu problemo aspektas kiel venĝo de la naturo kontraŭ viroj kiuj troe urĝis dum iliaj junaj jaroj. Tiutempe ili ĉiufoje malkontentigis la kunulinon kaj ofte devis aŭdi plendojn. Almenaŭ ŝi, el tia olda duopo, nun ne plu havas motivon por plendo.

Distro:

Kisoj vekas apetiton sed ne satigas!

LETERO (Alsendis Ennio)

- Panjo, per letero Petro petas mian manon. Ĉu vi konsentos ke mi edziniĝu al li? Aŭskultu lian leteron: Fraŭlino donacu al mi vian manon. Mi povas vivi nur por vi. Per floroj kaj baloj mi plenigos vian tutan vivon. Mi forigos viajn dolorojn. Kun via kiso mi iros al la fino de la mondo.

Panjo: - Ha, ha, ha... vi tute mislegis lian manskribon.

- Do legu vi mem, kion li skribis. Panjo legas: fraŭlino, donacu al mi vian monon. Mi povas vivi nur per vi. Per ploroj kaj batoj mi plenigos vian tutan vivon. Mi forigos viajn dolarojn. Kun via kaso mi iros al la fino de la mondo.

FRAŬLECO

Edziĝo havas sian bonan flankon. Ĝi instruas nin pri lojaleco, pacienco, toleremo, memregado kaj aliaj valoraj ecoj, kiujn ni ne bezonas se ni restas fraŭl(in)o.

BRIKO

Instruisto kunportis brikon en la klasĉambron kaj demandis siajn gelernantojn:

- Alrigardante ĉi brikon, pri kio vi pensas?

1ª – Mi pensas pri domo;

2ª – Mi pensas pri konstruado;

3ª – Mi pensas pri virinoj.

- Pri virinoj? Kial???

- Mi daŭre pensas pri ili.

12 DRINKOJ

Ulo eniras drinkejon. Tuj mendas 12 drinkojn samtempe. Li eltrinkas ilin rapide. La verŝisto scivolas: "diable, kial vi trinkas tiel rapide?" La ulo respondas: "Ankaŭ vi trinkus rapide se vi havus en la poŝo tion, kion mi havas."

- Nu, kion vi havas? -- La fripono, eltrinkinte la lastan glason respondas: "nur sepdek cendojn".